

# The American Esperanto Journal

OFFICIAL MAGAZINE OF THE  
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

ESPERANTO

AUXILIARY



LANGUAGE

INTERNATIONAL

Copyrighted, 1907, by the American Esperanto Association

Vol. I

JULY, 1907

No. 7

# The American Esperanto Association

(Founded 1905.)

*Honorary President*—Dr. L. Zamenhof.

*President*—Prof. G. B. Viles, Ohio State University.

*Treasurer*—Stephen W. Travis, Jr. *Secretary*—John Fogg Twombly.

Publication Office of the American Esperanto Journal is at 34 Green St., Brookline, Boston Postal District, Mass., U. S. A.

The American Esperanto Association exists for the following purposes:

- 1) To furnish information about Esperanto.
- 2) To provide students with proper books.
- 3) To provide certificates of proficiency in the language. Specimen examination papers sent for 10 cents.
- 4) To publish the American Esperanto Journal.
- 5) To unite with one another individual Esperantists and, especially, the Local Esperanto Societies.

Membership in the Association, including a year's subscription to the American Esperanto Journal, \$1.50. Send all membership dues to the Secretary, Am. Esperanto Ass'n, Boulevard Station, Boston, Mass.

## AFFILIATED ORGANIZATIONS:

*Help us and help yourselves* by becoming affiliated with the American Esperanto Association. This will cost you only \$2.00. You will receive a year's subscription to the American Esperanto Journal, the name of your society and the name and address of your Corresponding Officer will appear regularly on the cover of the Journal. Send the necessary information and money to the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass.

Massachusetts Agri. College Esperanto Club, E. Victor Bennett, 25 No. College, Amherst, Mass.  
Boston Esperanto Society, Edw. K. Harvey, Perkins Institution, South Boston, Mass.  
Esperantaj Pioneroj, Aaron D. Wolpe, Perkins Institution for Blind, South Boston, Mass.  
Brooklyn Esperanto Society, Durbin Van Vleck, 148 Hancock St., Brooklyn, N. Y.  
Cantibrigia Esperanto Group, Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.  
Harvard Esperanto Society, H. R. Shipherd, 69 Dana St., Cambridge, Mass.  
Esperanto Club of Chicago, C. E. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago, Ill.  
Leibniz Esperanto Club, Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.  
Univ. of Chicago Esperanto Society, Floyd B. Hardin, Middle Div. Hall No. 37, Chicago, Ill.  
Esperanto Club of Ohio State Univ., Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.  
Elgin Esperanto Group, Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.  
Everett Esperanto Club, Mrs. F. F. Driscoll, 161 Cottage St., Everett, Mass.  
Esperanto Society of Los Angeles, Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.  
Kansas State Agri. College Esperanto Club, Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.  
New Britain Esperanto Club, Rolland B. Moore, P. O. Box 700, New Britain, Conn.  
New York Esperanto Society, Stephen W. Travis, Jr., Lock Box 8, Tenafly, N. J.  
Jamestown Esperanto Club, Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.  
First Nebraska Esperanto Club, Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.  
Emory Esperanto Club, Jack Dempsey, Emory College, Oxford, Ga.  
Philadelphia Esperanto Society, Lewis B. Lueders, 206 S. 41st St., Philadelphia, Pa.  
San Diego Esperanto Society, C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.  
Searchlight Esperanto Club, Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.  
Seattle Esperanto Society, Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.  
St. Louis Esperanto Club, Mrs. Meade C. Dobson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.  
Winona Esperanto Club, Rev. J. J. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.  
Worcester Esperanto Society, Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.  
Portland Esperanto Society, Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.  
Esperanto Club of Rockford, Chas. Froeding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.  
Columbus Esperanto Society, M. Janet Rogers, 403 Luckhaupt Ave., Columbus, Ohio.  
L'Espero Esperanto Club, Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Maine.  
Auburn Esperanto Society, Clarence F. Welch, Sec., Recorder's Office, Auburn, N. Y.  
Good Templars Esperanto Club, Harry C. Welsh, Sec., care of M. M. Co., Missoula, Mont.



# The American Esperanto Journal

Vol. I.

JULY, 1907

No. 7

THE American Esperanto Journal is published by the American Esperanto Association. It is the official organ of the Association, and also of the local Esperanto societies in Boston, Chicago, New York, Philadelphia, Los Angeles, Seattle, etc. It is issued monthly by the Association and will aim to be especially useful to beginners.

All writers to the Journal must observe the following rules:

1. Write legibly or, preferably, "type-write."
2. Use paper as large as that of the Journal.
3. Write only on one side of the sheet.
4. Leave large spaces between the lines.

The Editors reserve the right to correct and to reject all manuscripts. No manuscripts will be returned except in the case of articles rejected, and only then, when such articles exceed 500 words in length, and are accompanied by return postage.

The American Esperanto Journal is a "propaganda organ." The editors and other workers on it give freely of their time and labor; writers of articles must do likewise.

Address articles to the REDAKTORO, AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Boulevard Station, Boston, Mass. News articles should be addressed to the REDAKTORO DE KRONIKO.

## AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

One subscription with membership in the American Esperanto Association.....\$1.50  
Journal alone, subscription price..... 1.00

Send all subscriptions to the *Secretary, American Esperanto Association*, Boulevard Station, Boston, Mass. Change of address costs 10 cents; no changes made during the summer months; your postmaster will forward your Journal during the summer for a few cents. Please address all complaints to the Secretary. The Journal does not regularly appear until the middle of the month; in July, August, September and October, not until the end of the month. For advertising rates address Stephen W. Travis, Jr., Business Manager, Tenafly, N. J.

We ask our readers to read and to study attentively the article by M. de Beaufront. By doing this they will learn a great deal about the qualities which are required for an international language: they will understand in what the value of Esperanto consists, and at the same time they will be exercising themselves in learning the language.

M. de Beaufront knows his subject very well. He is acquainted with many natural languages; he has thought about international languages, and has worked at them, both theoretically and practically, for twenty-five years. He also discovered (thought out) an international language very much like Esperanto, which he magnanimously destroyed after he became acquainted with the latter. He recognized the inferiority of his own language, because it was too much like the Romance languages,—in other words, for the very reason about which some persons are now congratulating themselves, when they talk about the superiority of their own invented languages. He is, therefore,

Ni petas niajn legantojn ke ili bonvolu legi kaj atente studadi la artikolon de Sro. de Beaufront. Tiel farante ili lernos multe pri necesaj ecoj de lingvo internacia: ili komprenos en kio la taŭgeco de Esperanto konsistas, kaj samtempe ili faros bonegan ekzercon en la lernado de tiu lingvo.

Sro. de Beaufront profunde scias sian temon. Li konas multe da lingvoj naturaj; li pripensis kaj prilaboris teorie kaj praktike pri internaciaj lingvoj dum du dek kvin jaroj. Li ankaŭ elpensis lingvon internacian multe similan al Esperanto, kiun li grandanime detruis, post kiam li konatiĝis kun tiu ĉi. Li rekonis la malsuperecon de sia propra lingvo, ĉar ĝi tro multe similas la Romancojn lingvojn,—aliavorte pro tiu kaŭzo mem, pri kiu multaj personoj erare fanfaronadas, parolante pri la supereco de siaj propraj alpensitaj lingvoj. Li estas tial bona

a skilled and experienced counsellor for those who are attracted by the *false idea of immediate comprehensibility*.

To understand a language at the first glance would indeed be a fine quality in an international language. Unfortunately, one cannot really have this. What seems such to some persons is only an "immediate understanding" for persons who are already acquainted with the Romance languages. Therefore, if we should trouble ourselves about this, we would sacrifice the great majority for the advantage of the few,—in order to make the international language easier for one-tenth of mankind, and the tenth even now the most favored by Esperanto, we would make it more difficult for the other nine-tenths. That certainly would be a foolish thing to do.

We ought always to remember that Esperanto is not only for Englishmen, Frenchmen, and Spaniards, but for the whole world: *it ought, therefore, to be as easy as possible for all.*

The best proof that one really knows a language is practical ability in the use of the language. He who can write a good letter in Esperanto, and can easily read a page of the *Krestomatio*, and, above all, can converse in the language with a foreigner,—such a man is a good Esperantist, whether he has a diploma of capability from a society or not. However, diplomas and certificates are useful for certain purposes: for example, they can assure the beginner that persons possessing such certificates really know the language, and thus can protect the beginner against deceivers and ignorant persons.

The American Association has, therefore, decided to establish an examination for the certificate of ability. This will be very similar to the examinations of the French and British Associations for the superior diploma. It will, therefore, be *difficult*: one will not be able to pass it, unless one has a good knowledge of Esperanto, both theoretical and practical. In order to succeed, one must know *well* the following three books:—

1. Zamenhof's Exercises (Bullen's Lessons).
2. *Krestomatio*.
3. Cox's Grammar or Fruictier's Syntax.

More important still, one must be able to write correctly a long letter and to translate a somewhat long piece of English literary prose.

A specimen of the examination questions will be sent to any one for ten cents. The examination is not easy; it will occupy several hours.

kaj sperta konsilanto por tiuj kiuj estas logataj de la trompilo,—la *tuja komprenebleco*.

La tuja komprenebleco estus kompreneble bonega eco de lingvo internacia. Malbonsorte oni ne povas efektive ĝin havi. Kio ŝajnas tia al kelkaj personoj estas *nur tuja komprenebleco por personoj jam konintaj la Romancojn lingvojn*. Tial, se ni klopodus por tio, ni oferus la plemulton por la profito de la malmultaj,—por igi la lingvon internacian pli facila por unu dekonon da l'homaro, kaj la dekonon eĉ nun la plej favorata de Esperanto, ni igus ĝin multe pli malfacila por la ceteraj naŭ dekonoj. Tio certege estus malsaĝa afero.

Ni devas ĉiam memori, ke Esperanto estas ne nur por la Angloj, la Francoj, kaj la Hispanoj, sed por la tuta mondo: *ĝi devas tial esti kiel eble plej facila por ĉiuj.*

La plej bona pruvo ke oni efektive konas lingvo estas praktika lerteco en la uzado de la lingvo. Tiu, kiu povas skribi bonan leteron en Esperanto, kaj facile legi paĝon de la *Krestomatio*, kaj antaŭ ĉio povas interparoli per la lingvo kun fremdulo,—tiu estas bona Esperantisto, ĉu li posedas diplomon de kapableco de societo aŭ ne. Tamen diplomoj aŭ atestoj estas utilaj por kelkaj celoj: ekzemple, ili povas certigi al lernantoj, ke personoj posedantaj tiajn atestojn konas efektive la lingvon, kaj tiel povas ŝirmi la lernantojn kontraŭ trompisto kaj malkleruloj.

La Amerika Asocio tial decidis starigi ekzamenon por la Atesto pri Kapableco. Tiu ĉi similo al la ekzamenoj de la francaj kaj britaj asocioj por la supera diplomo. Ĝi tial estos *malfacila*: oni ne povos venki ĝin, se oni ne bone scias Esperanton, teorie kaj praktike. Por atingi sukceson, oni devas scii *tre bone* la tri jenajn librojn:—

1. Ekzercaro Zamenhofs (Bullen's Lessons).
2. *Krestomatio*.
3. Gramatiko de Cox, aŭ Sintakso de Fruictier.

Antaŭ ĉio oni devas povi skribi korekte longan leteron kaj traduki iom longan elĉerpitaĵon el angla prozo literatura.

Ekzemplero de la ekzamena demandaro estos sendata al iu por dek cendoj. La ekzameno ne estas facila: ĝi eluzas kelkajn horojn de la

The "correctors" of the answers are persons who already hold superior diplomas from either the French or British societies.

Those who desire to take an elementary examination can legitimately obtain this from local societies which have at least one member who possesses a superior diploma from one of the above-mentioned associations. The Philadelphia and the Boston societies already possess such members. The Philadelphia Society has also established such an examination; and, when other societies shall be able to fulfill the condition mentioned, and wish to establish such an examination, we shall gladly announce this in the Journal.

This elementary examination has been established in order to provide an object for beginners' courses. Of course, it is much easier than the advanced examination; still, even this demands some real study of the language. If one does not know the Exercises of Dr. Zamenhof (Bullen's Lessons), or at least as much as is found in it, one cannot pass even the elementary examination. One ought also to be able to write correctly a short letter.

For this examination please address the Local Societies.

ekzamenato. La korektantoj de la respondoj estas personoj jam tenantaj diplomojn superajn de la franca aŭ brita asocioj.

Tiuj dezirantaj havi unuagradan ekzamenon povos rajte ricevi tiun ĉi ĉe lokaj societoj havantaj *almenaŭ unu anon posedantan superan diplomon* de unu el la suprecititaj asocioj. La "Philadelphia" kaj la Bostona Societoj jam havas tiajn anojn. La "Philadelphia" Societo ankaŭ starigis tian ekzamenon, kaj, kiam aliaj societoj povos plenumi la kondiĉon supreskribitan kaj volos starigi tian ekzamenon, ni volonte anoncos tion en la *Jurnalo*.

Tiu ĉi unuagrada ekzameno estas starigita por providi celon por la kursoj de eklernantoj. Kompreneble ĝi estas multe pli facila ol la supera ekzameno: tamen eĉ ĝi postulas iom efektivan studadon de la lingvo. Se oni ne scias la Ekzercaron Zamenhofan (Bullen's Lessons) aŭ almenaŭ tiom kiom troviĝas en ĝi, oni ne povas venki eĉ la unuagradan ekzamenon. Oni devas ankaŭ povi skribi korekte malgrandan leteron.

Por tiu ĉi ekzameno bonvolu turni sin al la lokaj societoj.

## THE AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

On page 13 of the present number of the Journal our readers will find a copy of the Constitution of the American Esperanto Association. By studying this carefully they will find that everything possible has been done to satisfy all legitimate interests. At the end of the year the council and officers will be renewed, and members will have an opportunity to vote for whom they like.

The Association is not a money-making affair, but it ought at least to pay for its clerical work, postage, and stationery. Last year there was a deficit of several hundred dollars, which was provided for out of the pockets of individuals. This year we hope to be able to balance our accounts, but, in order to do so, we must ask every one to spare us all unnecessary labor and expense.

*Every change of address for the Journal costs 10 cents*, and we must be notified at least a month beforehand. No changes of address can be made during the summer months. Leave your new address and a few cents with your postmaster, and he will forward your Journal to you during the summer.

We also ask our readers to remember that we

do not promise to send the Journal at the beginning of the month. Wait until after the middle of the month before writing to us. *In July, August, September and October, the Journal will not appear until the very end of the month.*

We should like to keep a full stock of all Esperanto books published, but it is impossible for us to do so. We therefore sell only a few books, and *only those which are best adapted for study, both elementary and advanced.* For other works send directly either to the BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, 13 Arundel St., Strand, London, W. C., Great Britain, or to the LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO, 46 rue Sainte-Anne, Paris (2e Arr.), France. The latter firm makes a specialty of songs, music, theatrical pieces, etc. Send U. S. postal money-orders, and you will receive your books ordinarily in a month's time. *Catalogues of either firm can be obtained from the American Association for a two-cent postage stamp.*

It will also save us trouble if subscribers to foreign journals will write directly to Europe for those journals. See page 3 of the cover for addresses. Send U. S. postal money-orders.

## DANGERA ILUZIO

(El la Aprila numero de *Lingvo Internacia*.)

The International Language can certainly be *immediately understood, and it ought to be, with the help of a dictionary alone*. If Esperanto did not have this quality, it would not merit our confidence, because it would offer to mankind an insufficient and erroneous solution of the question. On the other hand, it would not bring to the world anything better—quite the contrary—if it could be directly understood *without a dictionary and at first sight*, according to the desire of persons who have not sufficiently considered the true demands for the exact conditions of the problem. We will examine the matter wholly from a practical point of view, and will in this way prove the evil result which we should obtain, if we constructed an international language according to this program. But before everything else, we shall observe that even in this way we should reach (partially) only persons knowing one of the new-Latin languages or English, which is more than half new-Latin. And it seems to us that on the earth there exists many men who are not English, nor of Roman speech, nor learned persons. For this greater mass, which is in comparison with the other as a sea compared with a drop, Esperanto has labored, when for example it provided that the idea contrary to that presented by the root should be characterized by *mal*, as in French, *honnête, malhonnête* (English, *honest, dishonest*). Accordingly it gives us *mallonga, malforta, malriĉa*, k. t. p. But, says the searcher for understanding without the help of a dictionary, such a procedure is not international; if I choose *brev* for short, *debil* for weak, *povr* for poor, I will be immediately understood by every learned man. And, *in order to save a moment of study for the learned man, he imposes hours and days of labor upon every other man*, compelling him to learn, one after another, all words of opposite meaning. By this one fact he almost doubles for every non-English, non-Romance, or unlearned person, the labor requisite for the acquirement of the language, and puts uselessly a double burden on the memory. In passing, let us remark that even many English and Romance-speaking persons will not be reached by these roots of opposite meaning; they will really affect only the learned who have mastered the Greek-Latin roots existing in the classic languages and in some European languages. In this way, then, one gives money to the rich,

Tre certe la lingvo internacia povas kaj eĉ *devas esti tuj komprenebla* per la sola helpo de vortaro. Se tiun ĉi econ Esperanto ne havas, ĝi ne meritus nian konfidon, ĉar neplenan kaj eraran solvon de l'demando ĝi prezentus al la homoj. Sed, aliflanke, ĝi ne alportus al la mondo ion pli bonan — tute kontraŭe —, se ĝi estus rekte komprenebla sen vortaro kaj *unuvide*, laŭ deziro de personoj, kiuj ne sufiĉe pensadis pri la veraĵ postuloj aŭ la ĝustaj kondiĉoj de l'problemo. Ni ekzamenos la aferon tute praktike kaj tiel konstatos la malbonan rezulton, kiun oni ricevus, se oni verkus lingvon internacion laŭ tiu ĉi dua programo. Sed antaŭ ĉio ni rimarkigos, ke eĉ per ĝi oni atingus (*parte*) nur la personojn sciantajn unu el la novlatinaj lingvoj aŭ la anglan, pli ol duone novlatinan. Kaj ŝajnas al ni, ke sur la tero ekzistas multaj homoj, kiuj ne estas angloj, novlatinuloj aŭ kleruloj. Por tiu ĉi pli granda maso, kiu estas antaŭ la alia kvazaŭ maro kompare al guto, Esperanto laboris, kiam ekzemple ĝi fiksis, ke la ideo kontraŭa al la prezentata de la radiko estos karakterizata per *mal*, kiel france *honnête malhonnête*. Sekve ĝi donas al ni *mallonga, malforta, malriĉa* k. t. p. Sed, diras al si, la serĉisto de l'senvortara kompreno, tia procedo ne estas internacia; se mi elektos *brev* por mallonga, *debil* por malforta, *povr* por malriĉa, mi estos tuj komprenata de ĉiu klerulo.

Kaj, *por evitigi al la klerulo unu sekundon da lerno, li altrudas horojn kaj tagojn da laboro al ĉiu alia homo*, devigante lin lernadi unu post alia ĉiujn vortojn malajn. Per tiu ĉi sola fakto li preskaŭ duobligas por ĉiu neanglo, novlatinulo aŭ neklerulo la penadon necesan por akiri la lingvon, kaj metas senutile duoblan ŝarĝon sur la memoron. Ni pasante rimarku, ke eĉ multegaj angloj aŭ novlatinuloj ne estos atingitaj per tiuj malaj vortoj; ili efektive trafos nur la klerulojn ellernintajn la grek-latinan radikaron ekzistantan en la klasikaj lingvoj kaj en kelkaj eŭropaj. Konklude, oni tiamaniere donas monon al riĉuloj, tute forge-

forgetting entirely the poor; one sacrifices absolute facility of the organ for all, preferring a relative facility for the few.

But let us continue the examination. Esperanto derives from *preg* and from *ĉeval* the names given to the buildings specially reserved for prayer and for horses. For this purpose it uses the suffix *ej*, and says *preĝejo*, *ĉevalejo*. But, thinks the searcher for understanding at first sight, the scholar will not find, without a previous study of the suffix *ej*, the meaning of such words; I will therefore say: *eklezi*, *ekuri*. Truly with the help of Latin or French the scholar will immediately understand the two words, and because of this the before-mentioned searcher triumphantly rejoices. But what will be the practical result for 9-10 of mankind? This: they must still learn and remember a useless doubling of words. And what will be the logical result? Mere foolishness, especially in regard to the word *eklezi*; for naturally this word has in the system the two meanings which it possesses in the languages from which it is derived, namely, "building reserved for prayer" and "a community, a society of the faithful of the same creed."

Imitating Victor, *Victorine*, Lehrer, *Lehrerin*, *reina*, *regina*, etc., Esperanto indicates the female sex by *in*. It says, therefore: *fratino* (sister), *patrino* (mother), *onklino* (aunt), etc. But surely for scholars *soror*, *matr*, *tanta* would be more easily understood. Therefore, our seeker adopts them. What is the practical result for nine-tenths of mankind? Just the same thing as what has already been mentioned: a useless doubling of words for all terms relating to "kindred." What is the logical result? Truly an absurdity; for if *filius* gives *filia*, *consobrinus* *consobrina* in Latin, and if many names of kindred in our own languages derive their feminine forms from the masculine forms, all ought logically to proceed in the same manner in the international language. Are not father and mother, brother and sister, uncle and aunt, truly in the same degree of relationship among themselves or with respect to others as son, daughter, and cousin, female cousin? Why then should we imitate the error of many languages, proceeding in any other way for them and creating for their female names special words, which in no way recall the masculine forms? Are not father and mother the two parents? Are not brother and sister exactly in the same grade the two "born persons," one as male, the other as female? Why, then *patr* kaj *matr*, or *frat* but *soror*?

sante la mizerulojn; oni oferas la *absolutan* facilecon de l'organo por ĉiuj, preferante *rilatan* facilecon por kelkaj.

Sed ni daŭrigu la ekzamenon. Esperanto devenigas de *preg* kaj de *ĉeval* la nomon donatan al la konstruaĵoj speciale rezervitaj al la preĝo, al la ĉevaloj. Por ĉi tio ĝi uzas la sufikson *ej* kaj diras *preĝejo*, *ĉevalejo*. Sed, pensas la serĉisto de l'tuja komprenebleco, la klerulo ne trovos, sen antaŭa lerno de la sufikso *ej*, la signifon de tiaj vortoj; mi diros do: *eklezi*, *ekuri*. Vere per la latina aŭ per la franca lingvoj la klerulo tuj komprenos la du vortojn kaj pro tio la nomita serĉisto triumfe ĝojegas. Sed kia estos la rezultato praktika por la 9-10 de l'homoj? Tio ĉi: ili devos ankoraŭ lerni kaj memori senutilan duoblon de vortoj. Kaj kia estos la rezultato logika? Pura idiotaĵo, speciale pri *eklezi*; ĉar kompreneble tiu ĉi vorto havas en la sistemo la du signifojn, kiujn ĝi posedas en la devenaj lingvoj: "konstruaĵo rezervita por preĝi" kaj "aro, societo da fideluloj de sama kredo."

Imitante Victor, *Victorine*, Lehrer, *Lehrerin*, *reina*, *regina*, k. t. p. Esperanto montras la inan sekson per *in*. Ĝi diras do: *fratino*, *patrino*, *onklino* k. t. p. Sed, tre certe, por kleruloj *soror*, *matr*, *tanta* estus pli tuj kompreneblaj. Tial nia serĉisto ilin alprenas. Kia estas le rezultato praktika por la 9-10 de l'homoj? Ankoraŭ la sama, kiel pli supre: senutila duoblo da vortoj rilate al preskaŭ ĉiuj parencecaj nomoj. Kia estas la rezultato logika? Vera absurdaĵo; ĉar se *filius* donas *filia*, *consobrinus* *consobrina* latine, kaj se multaj parencecaj nomoj en niaj lingvoj mem venigas sian inan formon de la formo vira, *ĉiuj* devas logike procedi tiamaniere en la lingvo internacia. Ĉu patro kaj patrino, frato kaj fratino, onklo kaj onklino ne estas tiel vere sur la sama ŝtupo de parenceco inter si aŭ rilate al aliaj, kiel filo filino kaj kuzo kuzino? Kial do imiti la eraron de multaj lingvoj, procedante alimode por ili kaj kreante por ilia virina nomo vorton tute specialan, per nenio pensigantan pri la vira? Ĉu patro kaj patrino ne estas la du naskantoj? Ĉu frato kaj fratino ne estas ĝuste samgrade la du naskitoj, unu kiel viro, la alia kiel virino? Kial do *patr* kaj *matr* aŭ *frat* sed *soror*? Sekve unu fojon ankoraŭ la logiko estas ofendita kaj la praktika flanko forgesita.

Consequently once again both logic is offended and the practical side is forgotten.

Let us give a last example. *Homa* (relating to the man animal) kaj *homaro* (mankind) are in Esperanto very logically and very practically formed by the termination *a* or the suffix *ar*. But the searcher after immediate comprehensibility will prefer *human* and *humanitet*, or *humanitat*. Let us see the consequences. First, two new words to be learned, of which the termination tells nothing certain about its grammatical rôle; secondly, for each of them a double meaning, for *human* will mean, as in the languages which now use it both "what characterizes man" and also "who shows sympathy for men"; while in its turn *humanitet* or *humanitat* will mean, as in the languages which now use it, either "a collection of men" or "sympathy for men." We then arrive again at the same conclusion: logic is offended and the practical side forgotten.

We could multiply examples readily. We could even show other errors in the systems or projects for an international language which, encouraged by Esperanto and enlightened by it, have sought for and are still looking for immediate comprehensibility at the first sight of the text. But what we have said seems to us sufficient to make the error understood. And let us not be surprised if here or there a deceived scientist thinks that some system poorer than Esperanto is better than it. The fact is perfectly natural with regard to a system striving after immediate comprehensibility, especially in the case of scientists and scholars acquainted with the classic languages or French, or even English. They are very poor judges of the matter, for their knowledge makes them err. Understanding easily and with a mere glance the text presented, they judge the system to be better. They do not think that this is due to the fact that they already know all the words found in it. Now, if the object of an international language is immediate comprehensibility for scholars, let us give them Latin or any of the principal languages, and they will understand them still more readily.

But instead of presenting the text to a scholar knowing French or another Romance language, or to a scholar full of Greek and Latin words, give it to a Slav, a Swede, a Hungarian, a Turk, an Arab, a Japanese, etc., persons who know only their mother tongue, and you will find out what a miserable result you will obtain.

Certainly an Esperantist will not understand his text at the first sight of it; he will need one or two hours of study in order to acquire the

Ni donu lastan ekzemplon. *Homa* kaj *homaro* estas en Esperanto tre logike kaj tre praktike formataj per la finiĝo *a* aŭ la sufikso *ar*. Sed la serĉisto de l'tuja komprenebleco preferos *human* kaj *humanitet* aŭ *humanitat*. Ni vidu la sekvojn. Unue, du novaj vortoj lernotaj, kies neniam karakteriza finiĝo diras certe la specon gramatikan; due, por ĉiu el ili duobla senco, ĉar *human* signifos, kiel en la lingvoj ĝin uzantaj: "kiu karakterizas la homon" kaj ankaŭ "kiu montras simpatian por la homoj"; siaflanke *humanitet* aŭ *humanitat* signifos, kiel en la lingvoj ĝin havantaj: "kolekto da homoj" kaj "simpatio por la homoj." Ni do ankoraŭ alvenas al la sama konkludo: la logiko estas ofendita kaj la praktika flanko forgesita.

Ni povus multigi la ekzemplojn facilege, ni eĉ povus detale montri aliajn erarojn en la sistemoj aŭ projektoj de lingvo internacia, kiuj kuraĝigitaj de Esperanto kaj lumigitaj de ĝi serĉis aŭ serĉas ankoraŭ la tujan kompreneblecon ĉe l'unua vido de teksto. Sed tio, kion ni diris, ŝajnas al ni sufiĉa por komprenigi la eraron. Kaj oni ne miru, se, tie ĉi aŭ tie, ia trompata scienculo opinias pli bona ol Esperanto sistemon malpli bonan ol ĝi. La fakto estas tute natura, precipe aŭtaŭ sistemo celinta la tujan kompreneblecon, por la scienculoj kaj la kleruloj sciantaj la klasikajn lingvojn aŭ la francan kaj eĉ la anglan. Ili estas tre malbonaj juĝantoj en la afero, ĉar ilia sciado erarigas ilin. Komprenante pli facile kaj per simpla rigardo la tekston prezentitan, ili juĝas la sistemon pli bona. Ili ne pensas, ke la fakto venas nur de tio, ke ili *antaŭe scias ĉiujn vortojn en ĝi trovatajn*. Nu, se la celo de lingvo internacia estas la tuja komprenebleco por kleruloj, ni donu al ili la lingvon latinan aŭ iun el la ĉefaj lingvoj, kaj pli tuj ankoraŭ ili ĝin komprenos.

Sed antaŭ ol prezenti tiun tekston al klerulo scianta la francan lingvon aŭ alian novlatinan, al klerulo tute plena je grekaj aŭ latinaj vortoj, donu do ĝin al Slavo, al Svedo, al Hungaro, al Turko, al Arabo, al Japano k. t. p., k. t. p., sciantaj absolute nur sian patran lingvon, kaj vi konstatos, kian mizeran rezultan vi ricevos.

Ne, certe, Esperantisto ne komprenos sian tekston ĉe l'unua vido; li bezonos unu aŭ du horojn da lerno por akiri la gramatikajn ele-



grammatical elements, which will give him the "key" of that text and of others. But, when that shall have been done, he will learn the language by playing with it, and will not need to burden his memory with a *useless double load*. to burden his memory with a *double useless load*. He will easily find words for writing and for speaking. On the other hand, the adepts of a system founded upon comprehensibility for scholars without a dictionary, even when they are acquainted with the Romance languages and Latin, will struggle with a constant hesitation in order to write or speak: they will quickly understand *such a language*, but *they will need to study a long time, in order to get a practical command of it*.

Possibly it will deceive in the beginning some men, especially in the scientific world, but it will never be the international language of mankind. This prophecy, which we already made in the year 1901, we here repeat with full confidence.

Certainly the *formative elements* of the international organ ought to be international. But when one has chosen and collected them according to this principle, the language ought to compound and to multiply its words according to the few simple and easy rules which should properly belong to it. This is the only proceeding which makes it possible to establish a logical system and one easy to follow.

Truth, like virtue, is here in the middle road, and certainly the seekers after immediate comprehensibility in the international language are leaving this middle path, in which Esperanto remains. On this account, willingly or unwillingly, but inevitably, they will sooner or later confess their well-intentioned but regrettable error. I therefore counsel them not to cry out too loudly that they have discovered a solution better than Esperanto, for fatally and pitilessly time will dispell their illusion.

L. de Beaufront,

President of the French Esperanto Society.

(1) In the booklet written in both French and Esperanto, called "Structure of the Esperanto Dictionary.—Replies to Many Objections,"—Paris, Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain,—send 15 cents in U. S. postage stamps for it.

mentojn, kiuj donos al li la ŝlosilon de tiu teksto kaj de la aliaj. Sed, kiam tio estos farita, li lernos la lingvon ludante kaj ne bezonos ŝargi sian memoron per *duobla senutila portaĵo*. Li retrovos facile la vortojn por skribi aŭ por paroli. Kontraŭe la adeptoj de sistemo fondita sur la serĉo de l'senvortara komprenebleco por kleruloj, eĉ tiuj armitaj antaŭe per la novlatinaj lingvoj kaj la latina, baraktados en konstanta ŝanceliĝado por skribi aŭ por paroli: ili rapide komprenos (kelkaj), sed *ili bezonos senfinan tempon por lerni, por akiri tian lingvon*.

Eble ĝi erarigos, en la komenca, kelke da homoj, aparte en la sciencularo, sed neniam ĝi estos la lingvo internacia de l'homaro. Tiun ĉi profetaĵon, kiun ni jam faris en la jaro 1901-a (1), ni tie ĉi ripetas kun plena konfido.

Tre certe la *formantaj elementoj* de l'organo internacia devas esti internaciaj. Sed, kiam oni elektis kaj kolektis ilin laŭ tiu ĉi principo, la lingvo devas kunmetadi kaj multigadi siajn vortojn laŭ malmultaj reguloj simplaj kaj facilaj, kiuj propre apartenas al ĝi. Tio ĉi estas la sola procedo, kiu ebligas starigi sistemon logikan kaj akireblan por ĉiuj.

La vero, kiel la virto, estas en ĝusta mezo tie ĉi, kaj tre certe la serĉistoj de l'tuja komprenebleco en la lingvo internacia eliras el tiu ĉi ĝusta mezo, ĉe kiu restis Esperanto. Pro tio, vole nevole sed neeviteble, ili devos pli aŭ malpli frue konfesi sian eraron tre bonintencan sed bedaŭrindan. Mi do tre amike konsilas al ili ne krii tro laŭte, ke ili trovis solvon pli bonan ol Esperanto, ĉar fatale kaj senkompatate la tempo dispelos ilian iluzion.

L. de Beaufront.

(1) En la broŝureto france kaj Esperante redaktita "Strukturo de l-vortaro Esperanta.—Respondoj al multaj kontraŭdiroj." Paris, Hachette & Cie., 48 paĝoj, 10 x 15.—Price: 12 cents.



## ESPERANTISMO

La tuta homa historio povas esti dividata je kvar grandaj periodoj.

Lasante tiun tradician tempon, kiam ŝajneble ĉiuj homoj estis unu, havante unu komunan lingvon, la historio unue leviĝas sur la Periodo de Izoliteco. La ombro de Babelo kuŝas malvarme sur la mondo. Filoj Abrahamaj, Izaakaj, kaj Jakobaj vagas sur la tero kune kun siaj ne-hebreaj najbaroj, militante kunpuŝigante pro la malakordo de reciproka malkompreniĝado. Ankoraŭ la nacioj ne aperis. La regnatero estas la familio,—ĉiu familio por si mem.

Kiam tiaj familiaj gentoj, kies dialektoj similis unu la alian, unuiĝis kaj la nacioj ekaperis, tiam baldaŭ alvenis la Periodo de Venkado. Tartaroj enpenetris Ĥinujon. La Arianoj envenis Ĥindujon. Armeoj Egiptaj puŝiĝis suden laŭlonge de la Nilo. Asirio, Babilonano, Perso en intersekvaj fluoj ĵetis sin trans Sirujo kaj malgrand-Azio nur por esti reĵetataj de la grekaj armeoj de Aleksandro la Granda. Romo venkis Kartagon kaj farigis Mastrino de l'Mondo nur por fali sub la nerebateblaj paŝoj de la anaregoj el la malproksima Nordo. Klimakso de tiu miljara Periodo de venkado atingiĝis dum la mezaj centparoj, kies malhelan priskribon ni sciadas sufiĉe bone.

Sed lumo de la Renaskiĝo jam ekbrilas sur la tutmondan Periodon de Intermiksiĝado. Romanoj keĝ Galo ĉesis batali kun Goto, Vandalo, kaj Franko, interdziĝis, kaj en daŭro de kelkaj centjaroj ni havas Italon, Francon, Hispanon, Teŭtono ankoraŭ hejme en sia nordlando ektuŝiĝis de la spirito de kristana civilacio, kaj jen la moderna Germano. Kelto paciĝis kun Saksono, kiu laŭvice paciĝis kun Normano,—rezultas Anglujo. Eĉ sur la stepoj de la malgaja nordoriento grade la izolema Slavo eliris al la bona lumo de siaj eŭropanaj fratoj. Tiel kun la tempo naskiĝis la modernaj nacioj.

Ĉu disvolvado jam estas finita? Ne. Ĉiaj mondoj senĉese devas progresadi, neniam atingas perfektan. Kvara periodo komenciĝis,—memstara movado senkompare pli alta ol ia antaŭa en la monda historio. Ĝi estas la Periodo de Reciprokeco. Por pli bone ŝati ĝian signifon repaŝu ni la historian vojon, kion ni jam pasis, kaj ekrigardadu la gradan ŝanĝiĝadon de la homa spirito de antikvaj ĝis modernaj tempoj.

Progresado de la homa raso estis gvidata de kvar grandaj principoj, ĉiu el kiuj pli-malpli aperis en ĉiuj tempoj, sed ĉiu laŭvice karakteriza je la kvar grandaj historiaj periodoj, kiujn ni supre skizis.

Unue sin montras la Principo de Solidareco. Tiu estas la fundamento de ĉiu nacio, tiel antikva kiel ankaŭ moderna. Ĉiuj similaj malgrandaj gentoj devis unue kuncentriĝi, kaj ju pli la kuncentriĝo (kun la sameco pri aliaj aferoj) des pli forta la rezulta nacio.

La grekaj gentoj malsukcesis unuiĝi kaj jen ili kun la tempo englutiĝis. Jen kontraŭe la ĥina nacio, spite je ĝia rifuzado sekvi la ĝeneralan progresadon, tamen vivadis dum ĉiuj miljaroj—dank' al la praa Principo de Solidareco.

Sed homoj ne kontentas kun simpla defendo de la rajtoj propraj naciaj. Jam ekefikiĝis dua Principo, tiu de etendiĝeco. La fortaj devas gluti la malfortajn. Ĝi estas simpla natura instinkto. Aperis do la grandaj mond-imperioj. La unua granda principo ne forestas forgesita; ĉar rimarku, ĉiaj pligrandiĝoj kiaj estis ne naciaj, sed nur *personaj*, ekzemple la imperio de Aleksandro Macedona, neniĝis preskaŭ tuj kiam ili aperis, dum aliflanke ĉiuj daŭrantaj mond-potencoj,—Romo kaj la modernaj imperioj,—estadis esprimoj de la volo de la popolamaso. Kiel do Rome falis? Kiam ĝi ĉesis esti respubliko por fariĝi ilo de egoista Ĉezaro.

La tria granda principo estas inda produktaĵo de la homa rezonado, nome Alfarado. Pro tiu ĉi venkitaj popoloj ofte troviĝas efektive kvazaŭ venkintoj. Ili ĉesas barakti kontraŭ la rajto de forto, kaj komencas vidigi la forton de la rajto. Romo vidis la genion de Grekujo, kaj sendis siajn filojn por sidiĝi ĉe la piedoj de la grekaj filozofoj. Romo laŭ sia vico kronis siajn nordajn venkitojn per sia akirita civilacio. Kaj per intermiksiĝo montriĝis pli alta tipo de homo. La ekscitiĝema Kelto malsovaĝiĝis per la konserva Saksono, kiu laŭvice inspiriĝis de la energio de la Normano. Vireco de spirito tiel unuiĝis kun brileco de l'mento por formi la hodiaŭajn klerajn naciojn de Eŭropo kaj Ameriko.

Kaj jam aperas la Principo krona. Ĉiuj antaŭaj principoj estis por la familio, por la gento, por la nacio; sed tiu ĉi, la Principo de Reciprokeco estas por la homa raso. Ĝia fonto diferencas de tiu de ĉiuj antaŭaj principoj. Tiuj devenis al memamo, tiu ĉi el la Principo de Altruismo. La intruisto el kia ajn nacio rigardas la mondon kiel unuon, ĉiu parto estas por li, li por ĉiu parto.

Neegoistaj naciaj interrilatoj pli-malpli ja ekzistis en antaŭaj tempoj, sed neniam en la nuna grado. La deknaŭa centjaro vidis la veran naskiĝon de l'internacia vivo, kiam la

nacioj unuigis por renversi la lastan grandegan penon de milita tiraneco. Waterloo estis internacia venko por neniam mortonta internacia celo. Estas vero ke blinda memamo ankoraŭ vivadis *en* nacioj, kaj la eŭropaj registaroj ankoraŭ penis sin pligrandigi, detruante popolajn liberojn. Tamen la ligilo *inter* nacioj neniam perdiĝis. Ĝi estas kaj estos la fundamento de ĉiaj grandaj mond-agadoj por ĉiam.

Kaj nun por nia edifikado ni ekrigardu kiajn praktikajn rimedojn la mondo uzadis por la atingo de siaj grade-antaŭenigantaj celoj.

Ne estas malfacile kompreni kiel la homo prosperadis en la praaj tempoj. Estis per la *glavo*. Nenia leĝo alia iel efikadis tiam. Tiel ankaŭ en la konstruado de la imperioj de forto la glavo estis kompreneble la ilo.

Sed restas vidi iajn rimedojn, kiaj funkciis en la lastaj du nekomparinde pli altaj periodoj. Certe estas nek la glavo nek ia ilo de tia speco. Kia do?

Ni repaŝu denove al la pereema imperio de Aleksandro la Granda. Se li efektivigis nenion alian, li tamen helpis la grandan disvastigadon de la greka lingvo. Tiu ĉi fariĝis reala "lingvo franca" de la multe-disvastiĝita greka civilacio. Kiam la kristaneco aperis, ĝi ĝoje alprenis tiun ĉi "lingvo franca" kiel la grandan peron por sia propra bona disvastigado. Ankoraŭ malfrue la latina lingvo fariĝis siavice la pero de la kristana civilacio. Per tiu ĉi lasta lingvo kristaneco konvertis ĉiujn landajn de Eŭropo. Sen ia unu monda lingvo la moderna civilacio neniam povus esti farita. Ĉu ne vere? *Lingvo*, aŭ parolata aŭ skribata, estas ĝia *esenca* pero. Kaj lingvo devas resti la unua neforigebla rimedo de ĉiuj internaciaj rilatoj.

Jen tri specoj de lingvoj estas uzataj en tiaj rilatoj. Ne estas malfacile eltrovi el ili tiun, kiu estas la plej taŭga. Lord Bacon, volante certigi la konservadon de siaj ĉefverkoj por estontaj tempoj, skribis en la neŝanĝebla tial mortinta lingvo latina. Kaj tiu lingvo estadis la lingvo de la tutmonda instruitaro kiel ankaŭ de la eklezio. Ĝis nun ĝi restas la oficiala lingvo de la Romano-Katolika Eklezio. Sed rilatoj inter naciaj *civilaj registaroj* fariĝadas nuntempe per la naciaj lingvoj. Kaj ĝis nun ĉiuj

